BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA — DISTRITO FEDERAL

CGC Nº
00406 504/1000-06

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal,31 — AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 — Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal
Telefone 42-9090
70.000 — Brasília (DF)

~~Nº 18 - AGÔSTO DE 1.976 - BOLETÍM INFORMATIVO~~

Redatora Resp.-MARIA ALMADA - Enderêço:-SANTOS (SP)

Kie - Kiam -Esperanto ? !

Dum la XI Seminario de Esperanto okazinta en Brazilio(FD) estis decidite , ke la 1-a Latinamerika Kongreso de Esperanto okazu em Marilja (SP), en la jaro 1978-a.

Por la jaro 1980-a, estas planita Universala Kongreso de Esperanto en nia ĉef-urbo Brazilio.Tiu evento okazos la unuan fojon em Sud-Ameriko, pri kiu la esperantistoj, interesiĝas.

La XI Seminario okazinta en Brazilio brile sukcesis. Pro tio ni kredas, ke la UK pli bone organizota, havos memorindan rezulton, dank'al gastigemaj kaj amikaj brazilianoj.

La guberniestro,D-ro Elmo Serejo Farias plene apogis nian movadon.

Ni citas la vortojn de la prezidanto de la Seminario, direktitajn al lia Ekscelenca Moŝto:

"Exmo.Sr.Governador do Distrito Federal, Dr.Elmo Serejo Farias, DD.Patrono do XI Seminário Brasileiro de Esperanto.

Exmas.Autoridades Civis, Militares e Eclesiásticas.

..........

Excelentissimo Sr.Governador, mais uma vez agradecemos por todo o apoio que V.Excia.vem dando ao nosso Seminario.Se é certo, como diziam os romanos "Vox populi, vox Dei "-que o povo tem o govêrno que merece,- os brasileiros, em geral,- e os brasilienses,em particular, são todos plenamente felizes, graças ao elevado espírito dos seus dirigentes.Somos felizes por termos nascido neste país- jovem, pujante, que agora- encontra, graças ao trabalho do Govêrno do Exmo.Sr. Presidente Ernesto Geisel- o seu verdadeiro destino,- composição de destaque no concerto das nações do mun

do civilizado. Também com relação ao Esperanto, o Brasil se coloca entre os países mais adiantados de todo o mundo, pois aqui, - como na maioria das nações de primeira plana, o Esperanto não encontra obstáculos em sua marcha que, conquanto não seja acelerada, tem o avanço lento e seguro das obras definitivas, imperecíveis."

GAZETOJ RICEVITAJ

Aperigis sciigojn pri la XI Seminario de Esperanto la jenaj: Correio Fraterno do ABC, A Tribuna (Santos), Estado de Minas, Tribuna de Taubaté, Diário de S.José dos Campos, Correio Brasiliense, krom tiuj estas ankaŭ "Interligilo", Correio do Povo kaj La Lampiro. Dankon al ĉiuj:

NI SCIIGAS ...

Ke nia vicprezidanto el

VOLTA REDONDA (RJ), D-ro - Alberto Flores informis:
OPTIKO ESPERANTO - Estas - tre konata de ĉiu persono - en la urbo Volta Redonda - la vendejo de okulvitroj - kaj aliaj optikaĵoj kies - posedanto estas nia estimata kaj sindona S-ano João Andrade. La ŝildo de lia - vendejo, la afiŝoj en kelkaj lokoj de la urbo, kaj ankaŭ la paperoj por pakaĵoj estas bonaj propagandiloj pri nia lingvo.

La nomo "OPTIKO ESPERANTO" bone omaĝas nian karan Majstron Zamenhof, kiu estis - okulkuracisto kaj certe ĝojus vidi la vorton Esperanto kaj la belan verdan stelon sur la fasado de la optika vendejo de nia fervora S-ano Andrade.

KURSETO DE ESPERANTO - Estas atendinda la intereso de la spiritistoj de Brazilo pri Esperanto. Krom Brazila Spiritisma Federacio, ankaŭ la diversaj spiritismaj societoj tra la tuta - lando favoras kaj apogas - la instruadon de nia lingvo. Tiel same agas la estraro de "Spiritisma Societo Studantoj de la Vero", kiu invitis nian entuziasman samideaninon Iélem Medeiros Tavares por gvidi elementan Esp-kurseton en tiu Societo. S-ino Iélem tre efike plenumas sian taskon - kaj ĉiu sabate, dum unu horo instruas Esperanton al kelkaj tre interesataj personoj.

La estraro de la Societo planas efektivigi alian Esp-kurson, kiu nuntempe dormetas pro diversaj kialoj.

Ni gratulas nian karegan vicprezidanton D-ro Flores kaj ankaŭ al Volta Redonda pro tiuj informoj.

BARRA MANDA (RJ) - Laŭ informo aperinta sur "O LIder", sendita de nia vicprezidantino S-ino Denise A. Deslandes, nova kursoestos gvidata en "Grêmio - Barramansense de Letras" - por du grupoj depost la 14-a kaj 21-a de aŭgusto.

Gratulojn al gvidantoj - de tiu kurso al kiu ni el

tuta koro deziras sukceson.

NITEROJ (RJ) - D-ro Joaquim do Couto, prezidanto de Niteroi Esperanto-Klubo, informas, ke la monata skolta gazeto "Velha Guarda" aperigos rubrikon pri "Esperanto para Escoteiros".

Post la sciigo pri tiu movado aperinta en nia bulteno, plurajn informojn ni ricevis kaj múltajan leterojn tiurilate.

Ni sincere deziras sukceson al skoltoj.

CAÇAPAVA (SP) - Nia senlaca vicprezidanto Silva Velho sendis al ni informojn pri la vizito, kiun li faris al diversaj urboj, kie li propagandis pri nia movado.

BAURU - (SP) - En Bauru Silva Velho konstatis la utilan laboron de nia vicprezidanto Euclides de Carvalho, kiu gvidas kurson kaj efike disvastigas Esperanton en tiu grava regiono.

SOROCABA (SP) - En ĉi tiu urbo nia samideano Silva Velho kontaktis nian vicprezidanton Blaz Garcia, kiu ankaŭ laboradas efike por nia movado, aperigante artikolojn en lokaj gazeto (Cruzeiro do Sul kaj Diário de Sorocaba). Krome li ĉiam faras programojn ĉe la radio.

PROMISSÃO (SP) - Samidenao Lair Alves Moreira senlace batalas por pli bona disvastigo de Esperanto en tiu ĉarma urbo. Dank' al li ekzistas jam "Avenuo Esperanto" en la urbo kaj nun estis nomumita "Lazaro Luiz Zamenhof" alia avenuo. Tre laŭdinda tiu laboro de S-ano Moreira, kiu devas esti imitata de aliaj.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

De tempo al tempo, brazilaj parlamentanoj prezentas leĝ-proponojn por la enkonduko de instruado de la Internacia Lingvo. Sed ĉiu parlamenta inciato, sen apogo de la bazo, ne povas sukcesi. Tiu "bazo" devus esti forta asocio de Esperanto-Instruistoj, kiu internaci-skale jam bone laboras en tiu kampo. En Brazilo ne ekzistas ĝis nun sekcio de ILEI, kvankam multaj geinstruistoj sindediĉas kun sukceso al la instruado de nia lingvo. Ni alvokas ĉiujn geistruistojn, por ke ili sin anoncu ĉe nia Konsilantaro kun la celo starigi sekcion de ILEI en Brazilo-G.GRATTAPAGLIA.

ĜENERALA ALVOKO

De nia kara kaj sindona D-ro Humphrey Tonkin, indega prezidanto de UEA kaj de la societo Zamenhof, ni ricevis informon pri la situacio de ĉi tiu Societo en la monato majo pasinta, montrante statistike ke en la jenaj landoj aliĝis al ĝi:
Argentino 1; Aŭstralio 1 ; Belgio 7; Brazilo 6; Britio 5; Danlando 8; F.R.Germanio 13; Finlando 6; Francio 5; Grekio 3; Hispanio 1; Israelo 1; Italio 1; Japanio 1; Kanado 4; Meksikio 1; Nederlando 13; Norvegio 7 ; Novzelando 2; Portugalio 1; SVEDIO 36; Svislando 2 kaj USONO 26. Kaj li demandas: KIUJ LANDOJ PRETAS KONKURENCI ?

...... xxxxx .......

MONHELPOJ RICEVITAJ

Ni kore danks al la jenaj malavaraj kunlaborantoj la monsumojn donacitajn:

| | |
|---|---|
| Hersila Valverde | Cr$ 50,- |
| João O.Gama | 200,- |
| Tuto... | Cr$250,- |

---

La Redakcio dankas al ĉiuj bonkoraj kunlaborantoj, esperante, ke oni daŭrigu sendante informojn pri ĉio okazanta en iliaj regionoj.

"Sub la sankta signo de l'espero kolektiĝas pacaj batalantoj, kaj rapide kreskas la afero per laboro de la esperantoj".

ARGENTINO - El tiu najbara kaj progresema lando sendis al ni leteron nia amiko Dragutin Wranka, elstara esperantisto, kiu antaŭ multaj jaroj vizitis Brazilon.

S-ano Wranka laboradas senĉese en la monda kaj loka movado.

La redaktoro de "Tagiĝo", bulteno el Brazilio, difinis lian viziton tiel: " pasis meteoro sur la ĉielo de Brazilo".

Vere ni samopinias: S-ano Wranka estas brila meteoro sur esperanta ĉielo.

Ni dankas liajn afablajn vortojn rilatajn al nia laboro en nia Bulteno, Tiaj kuraĝigaj vortoj venintaj el tiel elstara samideano multe helpas al ni venki la malfacilaĵojn kaj nekomprenemon de kelkaj personoj , kiuj kriaĉas kontraŭ ni pro pura ambicio kaj egoismo.

..... xxxxx.......

BRAZILIO (FD)-La esperantistoj organizitanj-BREK - Brazila Radiamatora Esperantista Klubo - Alvokas ĉiujn radiomatorajn esperantistojn al pli oftaj kontaktoj kun eksterlandaj gesamideanoj ĉiudimanĉe, la 17-an horon, laŭ frekvenco je 14,250 Khz. Por pli detalaj informoj oni povas sin turni al Sanoj. Nid Dutra D'Amorim aŭ al la

S-ano Enivaldo Alves Silvar
Poŝtkesto 04-0144-70.000 -

Brazilio (DF).

SANTOS (SP) - Alvenis telegramo de S-ano Braz Cosenza prezidanto de KKE, konfirmante, ke la XII-a Seminario de Esperanto en la jaro 1977-a okazos en nia mondfama havenurbo Santos (SP).

Pro malfacilaĵoj, kiujn havis niaj gesamideanoj en Natal (RN), kie estis planita la okazigo de tiu Seminario, oni elektis novan lokon.

La prezidanto de BKE kune kun la Centro Esperantista de Santos akceptis la taskon apogante la decidon.

Ek de nun, ni kore invitas ĉiujn esperantistojn partopreni amase la XII-an Seminarion, kaj oni klopodos ilin akcepti per malfermitaj brakoj.

..... xxxx .......

NI KONDOLENCAS

D-ro Juscelino Kubitschek de Oliveira, eks-prezidanto de Brazilo, bedaŭrinde forlasis nin.

Tiu elstarulo eminenta estis persona amiko de la prezidanto de BKE.

Pri la agado de la fama JK oni multe scias, sed ke li estis favora al Esperanto preskaŭ neniu scias.

En la jaro 1959-a la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Varsovio, Polando. Ĝin partoprenis D-ro Coutinho, el Belo Horizonte. La vojaĝon ebligis la tiama prezidanto de la respub. Juscelino Kubitschek, donacinte al li la vojaĝbileton.

Estas doloriga perdo por ni esperantistoj kaj por la brazilanoj, kiujn li multe amis, la forpaso de la kreinto de Brazilio, kie laŭ lia dezir̂o li kuŝos por eterne.

Ni kondolencas lian tutan familion.

..... xxxx......

ESPERANTO OFICIALIGITA - Ne nur en Brazilo okazis tiu grava evento. Laŭ letero de nia korespondantino Eva Kiss, el Hungario, en tiu lando, precize en Budapeŝto, ankaŭ estas oficiala kurso de Esperanto en ĝia Universitato, kie same kiel en Brazilo, la disciplino Esperanto egalvaloras kun la angla , franca, germana kaj aliaj fremdaj lingvoj.

Ni esperas, ke tiel okazu en aliaj landoj tra la mondo.

.... xxxx ......

NITEROI (RJ)-D-ro Alvaro F. de Souza, nia vicprezidanto, informas, ke en tiu ĉi urbo, en la preĝejo "Rosa-Cruz" li havas Esp.to-kurson. Ni gratulas lin, dezirante sukceson.

BEJO - EKVEKIĜAS-HELPU ĜIN!

Post peniga laboro laŭ unulara movado aperas kaj deziras ekhavi helpon de la komprenemaj geesperantistoj. Jen la nova estraro, kiu gvidos

la societon:

Prez.:-Ciro Gomes Freitas
Vice-prez.: Rosana P.Camarez
Gen.Sekr.: Jorge A.Pereira
Kasisto:- Heloisa A. Faria
Publ.Ril.:-Mariza O. Dias.

Estas dezirataj aliĝoj al tiu reaperinta societo por la bono de Esperanto.

.......xxxxx.....

NATAL (RN)-De la Ĝenerala Sekretario de la Potigvara Esperanto-Asocio, ni ricevis la informon suban pri la elekto de ĝia nova estraro, kiu estas:
Prez.:-Prof-ro Waldson José Bastos Pinheiro;vicprezidanto:
Prof-ro José Mário Marques; ĝen.-sekretario:-Prof-ro José Luiz Cândido do Amaral;
kasisto:-Jaime Galvão Revoredo.-Kontrola Konsilantaro: Ruben Chacon Costa; Prof-rino Iraci Nobre Marques kaj Prof-ro Fernando de Oliveira Santos.

Al tiu nova grupo da batalantoj ni kore deziras plenan sukceson.

.....xxxxx.....

INTERNACIA POŜTISTA KAJ TELEKOMUNIKISTA ESPERANTO ASOCIO ( IPTEA )

Poŝtenska Kutija 25-Sofio en Bulgario - Ni ricevis peton pri diskonigo de la celo de tiu societo, kiu deziras reprezentanton en Brazilo.
Laŭ la adreso,ĉi tie donata, oni povas sin direkti al Societo petante informojn.

Estas jam kelkaj brazilanoj kiuj reprezentas la societon en siaj regionoj, sed en Brazilio ne estas, do oni deziras, iun en la ĉefurbo.

Oni povas sin direkti al la Societo petante la adresojn de la brazilanoj,kiu kontaktas ĝin kaj peras.

.....xxxxx.....

ŜAK-LIGO INTERNACIA - El Ĉekoslovakio venis ankaŭ peto pri aliĝo al tiu faka societo, kies adreso estas: S-ro Fiala Ladislav - Fügnerova, 28/18 - 29001-podebrady-Ĉekoslovakio.

.....xxxxx.....

NEŬTRALECO - Estas ĉiam bone, ke oni diskonigu nian agmanieron: same kiel UEA, nia BKE estas absolute neutrala, ĉu politike,religie, rase,ĉar estas nia deziro plibonigi la situacion de nia movado ne nur en Brazilo sed ankaŭ tra la mondo.

.....xxxxx.....

UBERABA (MAG) - D-ro Carlos Wutke informis, ke S-ino Maria Julia J.R. da Cunha gvidas kurson de Esperanto en ĉi tiu urbo kaj ke li iomete ŝin helpas.
Gratulon al ili ambaŭ!

UBERLÂNDIA (MG) - Ankaŭ de nia vicprezidanto D-ro Carlos Wutke, ni ricevis informon, ke en tiu urbo okazas nuntempe "Kurso de Esperanto D-ro Zamenhof" ĉe "Centro Espírita Fé, Esperança e Caridade". Ĝi funkcias de la 2-a ĝis la 3-a horo ĉiulunde. Partoprenas 14 gelernantoj. Ni deziras sukceson.

.......xxxxx......

CAÇAPAVA (SP) - Recebemos carta de nosso vice-presidente, Major Gilberto Silva Velho em que ele referindo-se ao movimento esperantista no Brasil disse que a divisão dos seus adeptos no País traz sòmente enfraquecimento ao movimento. Diz ele: "Todos nós podemos dar desinteressadamente um pouco de nós em favor do Esperanto e que êsse pouco, aqui, ali e acolá torna-se-á muito, dependendo ùnicamente da nossa boa vontade e da nossa colaboração. Sejamos unidos e seremos fortes num próximo futuro".

........xxxx.....

ESTAS MI ESPERANTISTO

Verda stelo sur la brusto -
iom pala pro la rusto.

Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento".
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.
Polkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
Kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido
"Bonan tagon! ĝis revido!"
Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikas,
la gvidantojn dorne pikas
Kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed nenion mi oferas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
en la buŝo Nova Sento;
ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
staros "rondo familia".
nekrologos ĵurnalisto:
estas mi esperantisto.

JULIO BAGHY;

JUIZ DE FÔRA (MG) - Estando nesta cidade progressista de Minas Gerais, nosso presidente fez uma visita ao Magnifico Reitor da Universidade Federal de Juiz de Fôra, Dr. João Martins Ribeiro, a fim de lhe testemunhar de viva voz o seu reconhecimento pela alta compreenção com que acolheu a introdução oficial do ensino do Esperanto naquela Universidade, fato que repercutiu no mundo inteiro sua relevância.

Durante a conversação que mantiveram informou o Mg. Reitor que recebeu um grande número de cartas congratulando-se com sua deliberação, reputando-a de alto nível e de grande importância para o campo cultural.

Disse ainda que o curso terá início no ano próximo e que se trata de uma criação irreversível.

......xxxx.....

CURSO DE ESPERANTO

10-a Lição

Estudemos os afixos, eles são divididos em prefixos e sufixos:

PREFIXOS

BO - serve para indicar parentesco por afinidade: PATRO-pai; BOPATRO - sogro;

DIS - serve para indicar divisão, desunião, dispersão: DONI - dar; DISDONI - distribuir; IRI - ir; DISIRI- dispersar

EK - indica começo de ação: IRI - ir, andar; EKIRI - começar a andar;

EKS - significa interrupção de emprego, ofício, MINISTRO ministro; EKSMINISTRO - Ex -ministro; EKSPREZIDANTO ktp-

MAL - indica o opôsto; BELA bonito; MALBELA, feio.

MIS - indica êrro, incorreção: UZI - usar; MISUZI - usar mal; MISKOMPRENO - mal-compreensão, engano.

PRA - indica parentesco distante: AVO - avô; PRAAVO-antepassado aquém do avô.

RE - mostra repetição: FARI fazer; REFARI - tornar a fazer, repetir.

Nos exercícios faremos a explicação detalhada ao utilizar os prefixos.

SUFIXOS

AĈ - pejorativo: DOMO - casa; DOMAĈO - casebre;

AD - ação demorada: PAFO - tiro;
PAFADO - tiroteio;

AĴ - forma substantivos de adjetivos: BELA - bonito, - bonita - BELAĴO - coisa bela;

AN - sócio, partidário: KLUBO-clube; KLUBANO - sócio do Clube;

ANT - INT - ONT - formas ativas dos participios verbais para o presente, o passado e o futuro: